

# esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 4 / 2014



## Literatura konkurso LIRO - 2014



La redakcio de **La Ondo de Esperanto** denove invitas al la tradicia literatura konkurso **Liro**.

Post la pasintjara eksperimento la organizantoj decidis konservi la novan strukturon de la konkurso. Ankaŭ en ĉi tiu jaro la konkurso havos nur tradukajn branĉojn.

Por Liro-2014 estas proponataj du tradukendaj verkoj:

1. Traduko el la angla: **The roads we take** – novelo de **O. Henry**.
2. Traduko el la rusa: **Muĥi** – poemo de **Aleksej Apuĥtin**.

La originaloj de la tradukendaj tekstoj estas elŝuteblaj en la reto, ekzemple:

- «*The roads we take*» en la *Projekto Gutenberg* \* ;
- «*Muĥi*» en *Wikisource*\* kaj en *Antologio de rusa poezio*\*.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.



Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). Oni povas sendi la tekstojn rete (slipoj estu sendataj en apartaj mesaĝoj), al la adreso [sezonoj@yahoo.com](mailto:sezonoj@yahoo.com).

La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1a de decembro 2014.

La laŭreatoj (unu en ĉiu branĉo) ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizantoj ĝis la 1a de januaro 2017 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la premiitaj konkursaĵoj en La Ondo de Esperanto, libroforme kaj elektronike.

La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizantoj en okazo de libroforma eldono. La plej bona traduko de la novelo de O. Henry aperos en la antologio de anglalingva literaturo, eldonota de Sezonoj.

Bonŝancon!

Halina Gorecka  
sekretario de Liro

\* Project Gutenberg: [http://www.gutenberg.org/ebooks/1595?msg=welcome\\_stranger#14](http://www.gutenberg.org/ebooks/1595?msg=welcome_stranger#14)

\* Wikisource (Муѣи): [http://ru.wikisource.org/wiki/Муѣи\\_\(Апуѣтин\)](http://ru.wikisource.org/wiki/Муѣи_(Апуѣтин))

\* Antologio de rusa poezio: <http://www.stihi-rus.ru/1/Apuhtin/40.htm>



## K O L O F O N O

39a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : [aktuala@esperantobruselo.org](mailto:aktuala@esperantobruselo.org) ;  
 Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la  
 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita  
 kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>  
**Prezidanto** : JM Nicolas de BUYL : [prezidanto@esperantobruselo.org](mailto:prezidanto@esperantobruselo.org) ; **Kasisto** : Jan Amadori [jan.amadori@gmail.com](mailto:jan.amadori@gmail.com)  
**Sekretario** : Laurent Loisse [sekretario@esperantobruselo.org](mailto:sekretario@esperantobruselo.org) , **Informoj / kursoj** : Françoise Pellegrin [fransuaz@esperantobruselo.org](mailto:fransuaz@esperantobruselo.org)  
**Eventoj** : JM Nicolas de Buyl [nikolao@esperantobruselo.org](mailto:nikolao@esperantobruselo.org) **Retejo de EBG** : [www.esperantobruselo.org](http://www.esperantobruselo.org)  
**Abona membriĝo** : 10 aŭ 13 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo  
**Kunvenejo** : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono .  
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo



## A G E N D O

**Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo** : [www.esperantobruselo.org](http://www.esperantobruselo.org)

**Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede** en nia kunvenejo en la konstruaĵo de la Eŭropa Komisiono,  
 Rue Van Maerlantstraat 2, 1000 Bruselo.

Novuloj, bonvolu sin anonci al [fransuaz@esperantobruselo.org](mailto:fransuaz@esperantobruselo.org) aŭ telefone +32 2 358 27 28

**EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,**  
**bonvolu kontakti [nikolao@esperantobruselo.org](mailto:nikolao@esperantobruselo.org) aŭ vespere 0478 382 981**

## JULIO - AŬGUSTO - SEPTEMBRO

\* La kunvenoj daŭrigos dum la monato Julio, sed **ne en Aŭgusto**

**Vendredo la 11a ĝis  
 la 13a de Julio**

**La Semo** : Muzik-, Cirk-, teatro-festivalo - Enghien-Edingen.  
 Trovu la ĝeneralajn informojn tie : [www.lasemo.be/2014/](http://www.lasemo.be/2014/)



**Sabato la 16a ĝis la  
 23a de Aŭgusto**

**FESTO 2014** : Tutsemajna Muzikfestivalo organizita de JEFO okazos ĉi-jare en  
 belega regiono en Pont-de-Barret proksime de Montélimar (Francio).  
 Vizitu la prian retpaĝon : [www.alesk.eu/festo2014/](http://www.alesk.eu/festo2014/)

**Merkredo la 10a  
 de Septembro**

**18:30 - 20:00 Kunveno kaj kursoj** :  
 Unua kunveno de la nova sezono ĉe EBG

El kie estas la aliĝintoj por UK-2014



Datumoj de <http://www.uea.org/kongresoj/alignintoj.php> en 2014-07-04

57	Argentino	14	Hispanio	18	Nederlando
8	Aŭstralio	5	Hungario	3	Nepalo
4	Aŭstrio	1	Irano	1	Nigerio
5	Belgio	1	Irlando	1	Nikaragvo
1	Benino	1	Islando	5	Norvegio
1	Bosnio- Hercegovino	3	Israelo	1	Peruo
154	Brazilo	22	Italio	16	Pollando
8	Britio	52	Japanio	3	Portugallio
5	Bulgaro	8	Kanado	2	Rumanio
3	Ĉeĥio	3	Kolombio	19	Rusio
7	Ĉilio	9	Korea Resp.	1	Slovakio
25	Ĉinio	2	Kostariko	1	Sud-Afriko
2	Danio	9	Kroatio	9	Svedio
1	Dominika Resp.	7	Kubo	11	Svislando
2	Estonio	1	Latvio	1	Ukrainio
8	Finnlando	10	Litovio	9	Urugvajo
34	Francio	3	Luksemburgo	23	Usono
35	Germanio	8	Meksiko	4	Venezuelo
		2	Mongolio	1	Vjetnamio

## Saluton Kara Legantaro !

Kial provi unuiĝi se ni timas renkonti alihorizontajn homojn ? Se ni timegas akcepti aliajn pensmanierojn, kutimojn, religiojn, ktp... La bazo de ĉiaj solidarecoj ŝajnas esti (ofte) renkontiĝoj. Ĉu sufiĉus por rompi stereotipojn ?

Tamen, ne ekzistas specialaj genoj por ŝteli, nek por almozi, nek por vice priŝteli, nek por nenifareco, nek por refaldiĝo sur propran komunumon, nek por sinmortigi pro religia motivo, ktp...

Senkonscie, aliuloj ankaŭ konstruas nin per iliaj regardmanieroj, konsidermanieroj. Malkiel spegubildo, minoritataj grupoj ĉiam batalu por havigi alian bildon de si mem.

Kiel fari por havi plijustan videcon de si mem, de ni, de la aliaj, de nia homaro ?

Dum tiu belega somero, krom amuziĝi Esperante ;-)), ni invitas ĉiujn vojaĝi, spertiĝi, informiĝi, legi, renkonti malsamajn homojn kaj kulturojn, lerni aliajn sintenojn, **kompreni niajn komunajn interesojn** en nia eta mondo.

Ĝojan kaj profitantan someron !

Viaj redaktoroj

[aktuala@esperantobruselo.org](mailto:aktuala@esperantobruselo.org)



## Enhavo

Paĝo 2 :	Liro
Paĝo 3 :	Kolofono kaj Agendo
Paĝo 4 :	Edito kaj Enhavo
Paĝo 5 :	Kiel allogi
Paĝo 6 - 9 :	La Retiriĝo
Paĝo 10 - 11 :	Ventoj el Pollando
Paĝo 12 :	KanzonoStaĝo ĉe MPS
Paĝo 13 :	Ciril kaj Roz, Vojaĝo per biciklo
Paĝo 14 - 17 :	Ferfojista Kongreso
Paĝo 18 :	Kvar prelegoj ĉe Youtube
Paĝo 18 :	Voĉo de la Tempo
Paĝo 19 :	Ŝanĝo
Paĝo 20 :	FESTO 2014



## Kiel allogi pli da lingvolernantoj ?

Jen estas demando, kiu obsedas ĉiujn kursogvidantoj sed la respondo varias laŭ la situacio. Laŭ mia sperto, la ĉefa problemo estas ne kiel instrui ilin sed kiel reteni ilin ĝis la fino de la kurso, kiel reteni ilin aktiviĝi en oficiala kadro kaj kiel igi ilin fidelaj movadanoj.

Pelmele mi prezentas sube kelkajn "solvojn", kiuj ne ĉiam trafas, bedaŭrinde :

- de tempo al tempo **investi en la informado, varbado kaj eĉ reklamo**

Mi ja rimarkas ke, pro diversaj kialoj, Esperantio ne tro ŝatas investi (en la senco "perdi monon" !) en la informado kaj reklamado kvankam tio estas necesa de tempo al tempo.

- daŭre uzi la **varbmetodon " de buŝo al oreloj "**

Se iu lernant(in)o havas bonan impreson dum la kurso kaj post kontakto kun la membroj de la klubo, li/ŝi nepre rakontos tion al siaj geamikoj tiel, ke iu alia el inter si decidus akompani lin/ŝin en la kurso. Kaj mi ne ĉesas instigi miajn gelernantojn paroli pri Esperanto al siaj respektivaj familioj kaj konatoj.

- montri al la junularo iom da **modernaspekta movado**

Je la unua kontakto kun novicoj, necesas montri al ili ke Esperanto estas vera lingvo, kiun uzas diversaj homoj. Mi montras al ili ke sufiĉas tajpi "Esperanto" en Google por ke aperu pli ol milionoj da artikoloj. Eblas elekti Esperanton kiel lingvon en Facebook, Ubuntu aŭ Mozilla Firefox. Ke nun androida sistemo por poŝtelefono uzas ankaŭ ĉapelitajn literojn. Krome, eblas lerni Esperanton per la reto, lumdiskoj kaj retradio...kaj ekzistas eĉ universitata kurso en Esperanto.

- provizi al la gelernantoj **korespondantojn**

Nepras prepari tion kiel eble plej frue kaj inici la gelernantojn skribi sian unuan, duan, trian eĉ kvaran leteron.

- tuj **uzi konkrete la lingvon** per kluba Eo-babilado, muziko, skajpo kaj Facebook, uzi sondokumentojn mp3 kaj enigi ilin en la poŝtelefonon de la gelernantoj, uzi la reton ĝenerale.

- **aliĝi ilin**

al la junulara sekcio de la loka nacia asocio, kie ili povas partopreni diversajn aktivadojn precipe kulturajn.

- **organizi oftajn renkontiĝojn kaj ekskursojn**

Certe tio permesas uzi la lingvon en iu amuza momento sed la ĉefa celo estas ke ĉiu sentu sin membro de iaspeca familio.

- oferti premion al la sukcesintoj de oficialaj lingvoekzamenoj

La premio varias de simpla simbola aĵo al valoraj donacoj. Gravus nur ke la instruisto kaj la nacia asocio **rekonu la klopodon faritan** de la junul(in)o por bone lerni la lingvon.



Henriel  
klubgvidanto

Madagaskaro



Esperanto kaj Malagasio  
<http://www.malagasio.org>

## La Retiriĝo (La Retirada) - Tradukita kaj adaptita de Floreal Martorell

► Morel poste renkontas Léon Blum, Vincent Auriol kaj Paul Boncour, dum ĉi tiu kunveno, li konfirmis ke nur la armila supereco de la naciistoj ebligis al ili venki en Teruel kaj en Aragono, kaj klare diris, ke la Respubliko bezonas tricent aviadilojn por inversigi la venkan procezon. "Necesas aviadiloj amase kaj tuj," diris li.

Sekve, en februaro 1939, li klopodas altiri la atenton de Daladier pri la milita valoro de supervivantaj trupoj de la hispana armeo venkita.

"( ...) Ĉi kelkaj miloj da iberaj tirajloroj meritas ke oni ne malestimu ilin ( ... ) Kun la necesaj antaŭzorgoj, kial ne uzi ilin kiel ni uzas la muzulmanojn?

Antaŭ la nacia intereso, nenio rajtas atendi, mi petas ke vi konsideru ke en februaro 1939, ni ne povas ignori la infanterian armean korpon ( ... ) ". Li ankaŭ firme kontraŭas la fitraktadon de la hispanaj oficiroj en la koncentrejoj.

La akceptiĝo en aliaj landoj dependas de la internacia solidareco, sed havas ne vere signifan impakton ..

Ĝi estas realigita de kelkaj eŭropaj demokratioj kiel Danio, Nederlando kaj Britio, sed speciale en Latin-Ameriko, memorante la lingvajn kaj kulturajn interligojn inter tiuj popoloj kaj la hispanoj. 40.000 respublikanoj iris al Sud -Ameriko (Argentino, Venezuelo ...) inter ili 15.000 aŭ 20.000 al Meksikio (Lando kiu engaĝiĝis kun la Hispana Respubliko ekde la unuaj tagoj de la milito).

Sinaia estis la unua ŝipo kiu foriris en majo 1939 el la haveno de Sète, kun hispanaj rifuĝintoj, al Latin- Ameriko. Sovetio,

kvankam oficiala aliancano de la Hispana Respubliko, hezitas longe antaŭ akcepti nur 4.000 rifuĝintojn (Precipe estraranojn de la PCE kaj ties familiojn kaj infanojn (5000), plejmulto el ili ne revenos en Hispanion, inter ili González Joachim (li foriris kiam li estis 5 jara kaj retrovis siajn gepatrojn en Francio, en la aĝo de 45 jaroj), al tiuj la aktuala hispana registaro proponas nuntempe la hispanan naciecon kaj pension.

Hispanaj ekzilitoj estas envolvitaj en la tumulto de la Dua Mondmilito, kiu estas la etendiĝo de ilia civila milito. Hispanaj batalantoj estos sur ĉiuj frontoj en ĉiuj lokoj kie ili batalos kontraŭ la faŝismo, en la armeo de Libera Francio, rezistado, deportado.




Hispanaj rifuĝintoj en Laborkompanio en Kantalo dum la dua mondmilito (konstruado de baraĝo por EDF en Saint-Etienne-Cantalès)





*Dormejo en barako en la Laborkompanio en Kantalo*



*Alfons Martorell en laborkompanio en Kantalo*



*Enirejo de la Mauthausen koncentrejo kie estis deportitaj multaj hispanaj respublikanoj*

Ili pagos pezan prezon por nia libereco malgraŭ ke la aliancitaj potencoj uzis ilin sen kalkuli, sed poste ili ne helpas ilin por forfaligi la hispanan diktatoron Franko.

Li mortis en sia lito en novembro 1975 , post punstrangoli kaj murdi siajn kontraŭulojn (Puig Antich....) ĝis sia lasta spiro.

Sed la hispana respublikana popolo lasos en la koron kaj menson de la homoj la legendo de sia fiero kaj digno, lia lukto kaj kuraĝo restos, por ĉiam, la honoro de ĉiuj, la honoro de ĉiuj humiligitaj de la tero.


***Prezento verkita de Véronique Salou\****  
***Tradukita kaj adaptita de Floréal Martorell***  
***Reviziita de Tonyo del Barrio***

\* **Notico :**

**Véronique Olivares Salou**, naskiĝis en 1953 en Parizo XXa. Ŝia patro estis hispana batalanto de la "Durruti-Kolono", deportita en la nazian koncentrejon de Mauthausen de la 13a de decembre 1940 ĝis la 5a de majo 1945. Ŝia patrino estis franca de patro (hispana) fusilita de la naziaj germanoj post malsukcesa eskaprovo el la mallibereja koncentrejo de Compiègne.

Ŝi jam publikigis ĉe la eldonejo Tirésias: "***La hispanaj respublikanoj en la nazia koncentrejo de Mauthausen***" (kunlabore kun Pierre Salou), "***Malnovaj kompanoj kies juneco estis ĉe doganistejo***", kaj kunlabore kun Michel Reynaud "***La Romano de Glières***", (Literatura premio pri la Rezistado 2007). -> pri Glières Makiso en Savojo en kiu aktive partoprenis hispanaj respublikanoj.







Tiu tradukita teksto estis la omaĝaj vortoj de Véronique okaze de omaĝa ceremonio en la koncertejo por hispanaj respublikanoj de **Septfonds**, en suda Francio norde de Tuluzo proksime de Montauban.

Poemo :

## La retiriĝo (*La retirada*)



Rokoj en Pireneoj , neĝaj montoj,  
Kriojn , plendojn kaj larmojn , al ni alportis la vento  
Kaj tiam, konsternitaj, ni same faris ;  
Ni estis ĉagrenitaj kaj furiozaj estaĵoj.

Mi memoras, marŝante sur la vojo  
Mi memoras la longajn kaj sinuajn padojn  
Malsato kaj malvarmo, timigitaj kiel bestoj,  
Serĉante , senesperaj , rifuĝon , kabanon .

Ekzilo forŝtelis la homan fidon  
Detruante la vivon, disŝirante la teron ...  
Sentante sur niaj korpoj erojn de ĉeno !

Retrovante infanojn, edzon , patron kaj patrinon,  
refortiĝante kaj forfuĝante mizeron,  
Post longa vojaĝo, ni revidis la lumon



**Poemo verkita kaj donacita de la anarkiista poetino Sara Berenguer.**

(NdIR) Jen filmoj vidindaj : Bv tajpi ĉe YouTube :«Manola Moreno Martorell» ,  
«Espagne 1939 la Retirada», «La Nueve», ...

... kaj ankoraŭ pluraj surrete :<http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo/539841>

## Ventoj el Pollando

De kiam ni (en HEF, Federación Española de *Esperanto*) komencis programi muzikon en la hispanaj kongresoj, kaj ĝi fariĝis unu el la plej ŝatataj eroj, kaj de kiam oni komencis registri la koncertojn kaj enretigi ilin, konstanta mia penso estis: “Tio ĉi devus aperi en Varsovia Vento“. Jes, tiu podkasto kiu fakte fariĝis la trafenda vojo se oni volas koni tion, kio novas ĉe la esperanta muziko, fakte la plej dinamike evoluanta parto de nia kulturo.

Finfine la revo efektiviĝis: vi nun povas ĝui pecojn de nia lasta kongreso en la varsoviaj ondoj. Ne nur muzikerojn, kiuj cetere jam antaŭe troveblis en la videa kanalo de HEF (73a Hispana Kongreso de Esperanto, YouTube), sed ankaŭ intervjuojn kaj aliajn sonscenojn. Nepre vizitu la adreson de la 101-a podkasta elsendo ([www.podkasto.net](http://www.podkasto.net)), kaj vi trovos en tiu ĉi momento la unuajn du partojn (tuj nun venos la tria). La bonŝanco ŝuldiĝas al la ĉeesto de niaj mirindaj Marketa kaj Vinga, kiuj agis kiel ambasadoroj de la skipo, surbendigante la materialon kaj prezentante la rolintojn, kaj al la posta lerta prilaboro de Irek kaj la ceteraj kunlaborantoj.

Ankaŭ mia voĉo aperas tie dise, kaj en aparta intervjuo, iom ĉe la komenco de la unua parto. Mi ne povas taksi, ĉar evidente por mi ĉiam strangas aŭskulti min mem (mi supozas ke tio sama okazas al preskaŭ ĉiuj), sed vi tre probable trovos ke mi

aperas prezidantece en la komenco, sed mi iom post iom malstreĉiĝas kaj finiĝas per laŭta kunrido. Ja bona etoso.

lamaniere tio povas montriĝi bona indikilo de la tuta kongreso, ja la bona etoso fariĝis ĝenerala trajto de la tuta renkonto, same kiel la ŝancelo inter la moŝta presidenteco (Kongresa inaŭguro - Inauguración del Congreso - Esperanto, YouTube) kaj la senĝena ĝuo karakterizis mian propran

sperton. Fakte, mi nun tre bedaŭras ke mi ne blogis antaŭe pri ĝi. Tro multaj aliaj taskoj igis min forlasi tiun ĉi blogon, malgraŭ mia volonto ke almenaŭ unu foje monate io devus aperi tie ĉi. Mi esperas ke nun mi tion povos plenumi.

Tio estas des pli malĝojinda ke mi estus povinta atentigi vin en aprilo pri niaj planoj, kaj la grandaj perspektivoj de la renkonto. Finfine ĉio konspiris por ĝin sukcesigi. Unue, tre bona nombro da partoprenantoj (mi

duonŝercis dum la fermo de la antaŭlasta kongreso en Zaragozo, kiu unuafoje post pluraj

jaroj atingis 100 ĉeestantojn, ke mi ne permesos malpli ol tiu nombro estonte, kaj jen, al tiu ĉi aliĝis pli ol 150!\*), multaj junuloj\* (kaj kiaj junuloj: agemaj, inteligentaj, ege simpatiaj kaj ĝojemaj!), alveno de sufiĉe da neatenditaj eksterhispaniaj amikoj (kun pluraj bonaj surprizoj, kaj inter kiuj ĉefan aludon meritas la nordafrikaj invititoj). Ankaŭ belega urbo, Arundo (hispane Ronda), kiun mi nepre rekomendas por via estonta vizito, kaj kiu



nin rimarkinde bone akceptis kaj apogis, kaj perfekta printempa vetero.



Pri la serioza parto de la programo mi ne insistas tie ĉi: vi povas prie legi en la lastatempe lanĉita Bitbulteno\* de HEF, en kiu ni resumis ĝin (kaj al kiu cetere mi invitas vin aboni, se vi interesiĝas iom pri la movado tie ĉi, plenigante la malgrandan formularon ĉe la dekstra parto de tiu paĝo). Sed ĉiukaze eĉ se vi ne povis veni ĉe nin, vi preskaŭ povas iel gustumi ĝian enhavon, pere de niaj registradoj, kiujn Migeluko Gutiérrez Adúriz\* tiel zorge prilaboradas. Komencu per tiu ĉi (73a Hispana Kongreso de Esperanto, YouTube), kaj poste vizitu nian tutan kanalon (<https://www.youtube.com/user/esesperanto>) kaj kelkajn apudajn\*.



El Pollando venis ankaŭ aliaj ventoj: ne nur la senditoj de Varsovia Vento, sed surprize grandparte de la eksterhispaniaj vizitantoj al la kongreso havis ian rilaton kun tiu lando, ĉu devene ĉu loĝe. Sed alian pollandan venton, kiu tuŝis min antaŭ nemulte, mi menciu. Nome, pri vento (ŝajne de libereco) temis ia artaĵo kiu

prezidis solenan akcepton ĉe la pola ambasado, okaze de festo kunmemore de la unuaj balotoj kiuj ekigis la politikan transiron en tiu lando. Rimarkinde, Hispana Esperanto-Federacio estis invitita partopreni la feston, kaj jen mi iris. La artaĵon super la HEFa prezidanto vi povas vidi en la apuda bildo, kiun hazarde publikigis la tŭitera konto (@PLenEspana) de la ambasado. Ke mi ne bone komprenas la signifon de moderna arto, kaj ke private mi tenas politikajn rezerveojn pri la prezento de tiu transiro ne malhelpis la viziton. Al mi ja multe plaĉas pollandaj ventoj!

Aŭskultu esperantan radion. Mi jam blogis pri tio antaŭ iom da tempo\*, kaj miaj rekomendoj restas validaj, eĉ se konfirmiĝas la malstabileco de la ŝutradioj, ĉefe se lanĉitaj de unuopuloj. Sed aliflanke la lanĉo de **Muzaiko** (NdIR, retradio), kaj la pluvivo de la plej profesiecaj, sendas bonajn espersignojn. Radio, ĉu tradicia ĉu reta, estas, kun la muziko kaj la fizikaj renkontiĝoj, la plej bona recepto por flegi la parolan Esperanton, kaj la pruvo ke nia lingvo vivas ekster papero kaj ekranoj.



Antonio Delbarrio (La Blogo de Tonyo)  
[www.delbarrio.eu](http://www.delbarrio.eu)

- \* 150 aliĝis <http://arundakongreso2014.wordpress.com/aligintoj/>
- \* junuloj <http://www.ipernity.com/doc/tonyo/32816555/in/album/665529>
- \* Bitbulteno [http://www.esperanto.es/hef/index.php?option=com\\_jnews&act=mailing&task=view&mailingid=18](http://www.esperanto.es/hef/index.php?option=com_jnews&act=mailing&task=view&mailingid=18)
- \* Migeluko Gutiérrez Adúriz <http://www.ipernity.com/home/liven>
- \* <http://www.delbarrio.eu/blo/2011/02/radioj-kaj-shutradioj/>
- \* «se vi forestos - kvaropo sinkopo», Youtube

## Oktoobra kanzonostaĝo ĉe MPS, en Artihues-près-Bordeaux



LA KOMPANOJ invitas vin al  
**kanzono-staĝo !!!**

Venu por kanti kun La Kompanoj !

Tiel ke ni preparu sufiĉan nombron da kanzonaroj kun partituroj, bonvolu perrete aŭ telefone informi nin pri via intenco partopreni en tiu speciala esperanto-kanto-staĝo kun viaj eventualaj manĝorezervoj ĉe [marcel.redoulez@wanadoo.fr](mailto:marcel.redoulez@wanadoo.fr)  
Tel. 05 56 21 38 64. Dankon. Vi pagos surloke al Monique, nia kara kasistino.

Sub impulso de FaMo kaj Marcelo

laŭ ekzemploj de la parizaj «Bachiques Bouzouks» kaj madridaj indignuloj, la Kompanoj preparas surstratan kunkantadon. Dum la UK 2015 estos proponite al la Lilla publiko kunkanti famajn francajn kanzonojn tradukitajn en Esperanto.

Esperanto-Gironde invitas vin al provkantado kaj selektado de la kantoj dum speciala semajnfino:

**Sabaton 11an kaj dimanĉon 12an de oktobro** en la **MPS (Maison de la Promotion Sociale) en Artigues-près-Bordeaux**, akompanate de FaMo (akordiono), Bernard Legeay (subasofono) kaj Isabelle Diaz (piano kaj akordiono).

La partoprenontoj ricevos kanzonaron kun la partituroj kaj la tekstoj por unuvoĉa interpretado de speciale tradukitaj kanzonoj de Brel, Perret, Belle, Renaud, Fugain, Bachelet, Telephone, Zaz, sed

ankaŭ Vian, Lemarque, Trenet, Béart, Bourvil... kaj kompreneble Brassens !  
Kantoj provotaj :

*Estas ĝoj' ! (verda :-)*  
*Estas festo !*  
*Volas mi !*  
*La nord-irlanda balado !*  
*Mina mond'*  
*Kiam restas am' nur*  
*Tuj la Kompanar'*  
*La dizertonto*  
*Kiam regos am' sur ter*  
*Majorana*  
*Lili*  
*La senlima esper'*  
*Dormu karuleto !*  
...



Ne maltrafu tiun eventon por amuziĝi !

Aliĝkotizo (inkluzive kantaron kun partituroj) : 15€

Eblas rezervi manĝon en la MPS (antaŭ la 20a de septembro) por sabato vespere kaj dimanĉo tagmeze po 11,50€.

Kelkaj tranokteblecoj disponeblas ĉe lokaj esperantistoj aŭ simpatiantoj. Ilin bonvolu peti antaŭ la 20a de septembro. Se ne, hoteloj proksimas.

Kiel atingi la MPS ?

<http://www.maisondelapromotionsociale.org/infospratiques.htm>

Pliaj informoj ĉe :

[marcel.redoulez@wanadoo.fr](mailto:marcel.redoulez@wanadoo.fr)

Esperanto-Gironde



# Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'



## Makedonio

(7/5 -> 9/5/2009 - 129 km => 3989 km)

▷ Ni ĉiam feliĉas kiam ni alilandiĝas. Tio signifas finon de aventuro kaj komenciĝon de alia. En Makedonio oni skribas per la Cirila alfabeto. Legante Makedonia Respubliko de sur landlima ŝildo ni jam lernas plurajn novajn literojn, ĉar estas ankaŭ traduko en la latina alfabeto. La vivo en Makedonio tiom malmulte kostas, ke la tridek eŭroj ŝanĝitaj je nia eniro montriĝos pli ol sufiĉaj por kontentigi ĉijn niajn bezonojn dum nia tritaga restado. Je la fino ni eĉ bezonos kvar foje aĉeti manĝaĵojn por sukcesi likvidi niajn lastajn denarojn antaŭ ol eliri el la lando.



Intertempe, la unuan vesperon ni sensukcese provas gastigi ĉe esperantistino de. Ne eblas kontakti ŝin rete, ŝia telefono ne funkcias kaj ŝi ne estas hejme. Dume bicikle sekvas nin pluraj urbanoj por proponi al ni dormĉambron po 5 € persone. Ni fine senpage dormas sur herbejo flanke de la belega urba lago.



La morgaŭon ni vespere retumas. Ni demandas en retrinkejo ĉu ni rajtas konekti nian USB-memorilon kaj oni direktigas nin al la aliflanka normala trinkejo, kie oni senpage pruntedonas porteblan komputilon kaj donacas la konekton "ĉar ni venas de malproksime".



Ni tie ricevas esperantlingvan mesaĝon el Rusio, kiu demandas "Kial Cirilo estas tiom sunbruniĝinta dum Roz tiom blankas. Ĉu ŝi senĉese restus malantaŭ Cirilo por profiti de lia ombro?" Finfine jen humurplena mesaĝo! Nu, jes, en la ombro de ĉiu grava viro troveblas virino, tio ja famas.

(daŭrigota)



## La 66-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

### 17 - 24 majo 2014

Jam la sesan fojon fervojistoj kongresis en Italio. Ĉi-foje la evento okazis en San Benedetto del Tronto, kiu situas ĉe la Adriatika marbordo proksimume 300 kilometrojn sude de Bolonjo. Ĝi estas precipe turisma urbo ornamita per palmoj. Ili beligas la urbon laŭlonge de la strandoj. La pasantoj ĝuas ilian agrablan ombron ankaŭ en promenejoj kaj stratoj. Ĉe la havena moleo impresas reliefe skulptitaj kaj pentritaj ŝtonblokoj, kie multaj vizitantoj ŝatas promeni kaj admiri tiujn nekutimajn artaĵojn.

La kongreson partoprenis 135 geesperantistoj el 19 landoj. La plej malproksimaj venis el Ĉinio, Israelo kaj Kubo. La ĉina delegacio venis ĉefe por inviti la partoprenantojn al la venontjara fervojista kongreso okazonta en la urbo Kunming de Ĉinio. Estis prezentata mallonga filmo por montri al ni la medion, en kiu oni kongresos.

La kongreso okazis en la kvarstela hotelo Calabresi, kie ni estis varme akceptitaj kaj bone nutrataj per bongustaj manĝaĵoj. La hotelo estas bone lokita apud la urbocentro kaj tute proksime al la plaĝo, kiu longas je kvar kilometroj. En la kunvensalono de la urbodomo estis instalita ekspozicio de miniatura regiona fervojlinio kun funkciaj trajnetoj. Vid-al-vidaj paneloj informis pri la okazanta kongreso kaj pri Esperanto. La

balustradon de la hotelo ornamis granda banderolo anoncanta la kongreson kaj apude estis fiksita verda E-flago videbla de malproksime. Do multaj preterpasantoj eksciis pri la ekzisto de Esperanto. Grandan intereson pri la evento montris ĵurnalistoj. Okazis pluraj intervjuoj kaj aperis multaj artikoloj en lokaj ĵurnaloj, elsendoj en radio kaj en televido.

Dum la solena inaŭguro bonvenigis nin la prezidanto de LKK Vito Tornilo, la honora prezidanto de IFEF Romano Bolognesi, la vicprezidanto de itala E-Federacio Renato

Corsetti, la posedanto de la hotelo Fausto Calabresi, la skabeno de la urbodomo kaj la lokaj fervojistoj. Nome de UEA salutis kaj bondeziris sukcesan kongreslaboron Barbara Pietrzak. Salutvortojn aldonis ankaŭ Lina Gabrielli, konata itala poetino. Sekvis salutoj de reprezentantoj de la landaj asocioj. LLK-anoj

ricevis donacojn de kelkaj salutantoj. Jindřich Tomášek la ĉefdelegito de IFEF legis alvenintajn salutmesaĝojn. La prezidantino de IFEF Rodica Todor honorigis meritplenajn personojn per diplomo kaj post sia festparolado ŝi malfermis la kongreson. Poste sekvis komuna fotado antaŭ la hotelo.

Dum la kongresa semajno okazis pluraj labor- kaj komitatkunsidoj, prifervojaj fakprelegoj. Kunvenis ankaŭ terminara komisiono por decidi pri kelkaj fervojaj terminoj. Rodica Todor proponis ŝanĝojn



kaj reorganizado de la strukturo en IFEF kaj iniciatis grupan laboron laŭ la modelo de UEA. Oni informis pri movadaj aferoj kaj novaĵoj el la fervoja mondo. Interesis novaĵo el Japanio pri refunkciigita Sanriku-fervojo nur kvin tagojn post la tertremo kaj cunamo en la jaro 2011. Krome estis proponita ILEI baza kurso de Esperanto.

La partoprenantoj ĝuis ĉiutage vesperajn kulturajn programojn. Kantis por ni Grazia Barboni, Manuel Rovere regalis nin per romantikaj kantoj kaj de la Trio "Malamuzika" ni aŭskultis napolajn melodiojn. Tre agrable estis vespero ekstere en la apuda parko, kie ni aŭskultis belajn italajn melodiojn el sesdekaj kaj sepdekaj jaroj kaj samtempe ni ĝuis dancprezenton. Ne mankis folkloraj prezento kaj posta dancado sub stelplena ĉielo. Surprize nia ĉina samideano kantis itale "O Sole Mio".

Dum la ekskursoj estis eble viziti Marmuzeon. Kun loka ĉiĉeronino ni promenis tra la urbo aŭskultante klarigojn pri ĉiuj modernaj kaj novstilaj skulptaĵoj. Tre enhavriĉaj estis kongresaj kaj postkongresaj ekskursoj! Ni vizitis urbon Asoli Piceno, kie ni estis akceptitaj en la urbodoma kunvenejo. En Loreto ĉarmis la Sankta Domo, en Recanati palaco Leopardi de la 18-a jarcento, en Castefidardo ni admiris kolekton da akordionoj kaj viglan akordioniston, kiu regalis nin per gajaj muzikaĵoj. En Ancona ni renkontis s-ron Aldo Grassini, kiu en ĉi loko iniciatis taktilan muzeon "Omero". Oni povas tuŝi ĉiujn objektojn. La muzeo estas konceptita ĉefe por blinduloj. La urbo Ripatransone ĝueblas per sia historia centro kaj famas pro la plej mallarĝa strateto en Italio. En la vilaĝo Offida ĉirkaŭata de vinberejoj ni gustumis tieajn vinojn, kiujn ni povis poste aĉeti. Ĝis nun

estas en la urbo praktikata tradicia punto-arto.

La postkongresaj ekskursoj gvidis nin unue al Frassasi-kaverno. Admirinda sceno atendis nin subtere. En la urbeto Civitella del Tronto troviĝas la dua plej granda defenda konstruaĵo en Eŭropo. Ni trapasadis tiun fortikaĵegon de unu ekstrema flanko al alia. Kaj la postkongresan ekskurson ni finis en la urbo Fermo.


La italaj esperantistoj preparis enhavriĉan kongreson en agrable ĉe-mara loko. Laŭdinda estas la belaspekta ilustrita kongresbroŝuro kun bonvenigaj paroladoj de diversaj personoj kaj informoj pri ĉiuj okazantaĵoj, pri vizitotaj lokoj dum la ekskursoj. Krome estis eldonitaj tre belaj bildkartoj kaj glumarkoj respegulantaj trafan fervojan simbolon. Ni povis ĝui senpagan tutsemajnan busveturadon tra la tuta urbo. Funkciis ankaŭ libroservo provizita de Petro Chrdle el Ĉeĥio. Ĝuante, ĝojante kaj distriĝante plene ni havis tre bonan impreson pri la ĉi-jara fervojista E-kongreso. Ĝi estos memorinda pro abundaj kaj tre bongustaj manĝoj en la hotela restoracio Calabresi.

Koran dankon meritas niaj italaj kolegoj kaj ĉiuj, kiuj kontribuis al bona disvolviĝo de la evento kaj amplene zorgis pri la bonfarto de ĉiuj partoprenantoj!

Liba Gabalda



# La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn







RIMINI



SAN MARINO



66a KONGRESO de I.F.E.F  
17-24 majo 2014  
ESPERANTO  
SAN BENEDETTO DEL TRONTO



LORETA



RIPATRANSONE



la plej mallargâ stratego



SALUTON EL ITALIO



RECANATI



OFFIDA



CIVITELLA




Kaverno FRASASSI



FERMO

## Kvar IKU-prelegoj en la reta kinejo

Kvar filmitaj prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato en la 97-a UK en Hanojo en 2012 aldoniĝis al la kolekto de la Reta Kinejo de UEA en  .



Ĉiuj filmoj estis realigitaj de Francisco Luis Veuthey.

Du prelegoj temas pri arto. Sub la titolo «**Movado aŭ kulturo ?**» (53'), prof. Humphrey Tonkin traktas la ideologian bazon de la Esperanto-poezio, dum Jonathan Cooper parolas pri Moderna arto: «**Kio ĝi estas kaj de kie ĝi venas ?**» (2-a parto, ambaŭ kune 51').


D-ro Jukka Pietiläinen havas ĵurnalistikan temon, «**Novaĵoj translimen**» (57'), sub kiu li analizas la geografian strukturon de internaciaj novaĵoj.

«**Kiu kontrolas la registarojn de la mondo ?**» demandas d-ro Gábor Márkus, priskribante mekanismojn en diversaj landoj por kontroli la funkciadon de ties registaroj.

En la retejo de IKU troviĝas listo de ĉiuj prelegoj, kies filmregistaro estas videbla en la Reta Kinejo. La tekstoj de la prelegoj estas publikigitaj en la t.n. IKU-libro.

El Gazetaraj Komunikoj de UEA - Redaktoro: Liu Zijia

## Eduardo Galeano «Voĉo de la Tempo»



## Manlaboristo

Mohammed Aŝraf ne iras al lernejo.

De mateniĝo ĝis leviĝo de la luno li tranĉas, distranĉas, boras, muntas kaj kudras la piedpilkojn kiuj eliras el la pakistana vilaĝo Umarkot kaj ruliĝas al la stadioj de la tuta mondo.

Mohammed havas 11 jarojn. Li faras tiun laboron ekde 5-jaraĝa.

Se li scius legi, kaj se li scius legi la anglan, li komprenus tion kio estas skribita sur la etiketoj kiun li algluas al ĉiu de siaj faritaĵoj : «Tiu ĉi pilko ne estas farita de infanoj».



## Konatiĝu kun Ŝanĝo



Ne pasis ankoraŭ duonjaro ekde la debuto de la grupo en la Esperanta mondo, sed ĝi iĝas ĉiam pli populara en Esperantujo kvankam la grupanoj tute ne parolas Esperante! Temas pri la grupo Ŝanĝo, kiu debutis en ĉi-jara JES (Junulara Esperanto-Semajno en Szczawno-Zdrój). La junaj muzikistoj el Vroclavo kun multaj, ofte strang-aspektaj muzikiloj, ravis la publikon per sia nekutima muziko kun Esperantaj tekstoj.

Malofte okazas, ke popularaj muzikistoj elektas Esperanton. La anoj de Ŝanĝo agas en grupoj, konataj kaj ŝatataj en Pollando. Ekzemple, Kamil Rogiński, la fondinto de Ŝanĝo, muzikumis, interalie, en Orkiestra Rivendell, R.U.T.A, Klinika Lalek kaj Ocelot.

La elekto de Esperanto estas forte ligita kun la ideologio de Ŝanĝo: ili kredas je paca mondo de egalaj homoj, devenintaj de diversaj kulturoj kaj mondopartoj, kiuj povas kompreni unu la aliajn kaj vivi en amikeco, kvazaŭ "granda rondo familia". Kiam mi unuafoje interparolis kun ili, mi tuj komprenis, kial ili elektis Esperanton – ili estas esperantistoj en siaj koroj! Post dujara laboro ili ĵus eldonis sian unuan K-diskon! En ĝi Esperante kantas, interalie:

Maciej Balcar el la pollanda blusroka grupo Dżem, portugala fado-kantisto João de Sousa, aktorino Natasza Sołtanowicz, hungara ŝamanino Halina Bergerné Wilk. Ŝanĝon subtenas la grupo Foliba, kies specialaĵo estas tradiciaj ritmoj el okcidenta Afriko. La kovrilon ornamas bildoj de la gvidanto de Ŝanĝo Kamil Rogiński.




La JESa koncerto tiom plaĉis al junuloj, ke PEJanoj decidis plivastigi kunlaboron kun la grupo. La PEJa logo aperis sur la kovrilo de la debuta disko de Ŝanĝo, kies titolo estas Ŝanĝo de la vibrado de la terglobo. La grupo komencis koncertvojaĝon: la unua koncerto okazis en Kautzen (Aŭstrio). Baldaŭ okazos koncertoj en Varsovio kaj Vroclavo. Kiam denove en Esperanta kongreso? Ni atendas senpacience.

Jezirowska

Papere: *La Ondo de Esperanto*, 2014, №7.

Rete: *La Balta Ondo* <http://sezonoj.ru/2014/07/237shangho/>

NDIR : Tajpu «Ŝanĝo de la imago» ĉe .



# FESTO 2014 REVIGLIGI LA PLANEDON



## Muzikfestivalo FESTO

**Pont-de-Barret (en Provenca Dromo, departemento 26) de la 16-a ĝis la 23-a de aŭgusto 2014**

FESTO estas festivalo pri muziko kaj kulturo organizita de francaj junaj esperantistoj (JEFO). Ĝi okazas ĉiu jare dum aŭgusto en Okcidenta Eŭropo. Tiu festivalo kunigas homojn el ĉiuj aĝoj kaj landoj ĉirkaŭ komuna amo por muziko, interŝanĝo, kaj revo pri mondo sen limoj.

Se Esperanto estas internacia lingvo, muziko estas internacia gusto kaj estas dum FESTO kiam kuniĝas ambaŭ, kaj esperantoparolantoj kaj lokaj muzikgrupoj por miksiĝi.



Sed FESTO ne konsistas nur el koncertoj : dum la tago okazas muzikatelieroj, artistaj, sportaj, kulturaj kaj lingvistikaj kaj ankaŭ kulturaj kaj turismaj ekskursoj...

Dum nokto, vivo daŭras kun diskoteko, d/trinkejo kaj gufujo (ĉi-jare apud kampofajro), lokoj favoraj por amuziĝi, babili kiel refari la mondon kun ĉies revoj.

Ĉi-jare 2014, FESTO spertos la kuniĝon de movadoj esperantista, vegana kaj okcitanista inter aliaj. Partoprenantoj ĝuos riĉecon kaj interŝanĝojn. Kaj eble, fine de la semajno, kelkaj estos anoj de la tri movadoj!

La aliĝilo troviĝas ĉi-tie: <http://www.alesk.eu/festo2014/aligo/>

Venu por malkovri Okcitanaprovencon kaj ĝui someran naturon, babili Esperante, trovi novajn amikojn dum belegaj koncertoj (ĴeLe, Zhou-Mack Mafuila, Platano, Melono, Patric, Fara Nume, Flankenpaŝo, Jim Petit, Môrice Benin, Lou Dàvi en Dub, Krio de morto) kaj akustikaj koncertoj, dumtaga atelieroj (Salikplektado, sledgitaro, fabelrakontado, kanto, kantoverkado, ukulelo, masaĝo, ktp.), rilaksi kaj viziti ĉirkaŭaĵon!